

TEA-BULTENO

18^A JARO - N^o 128

NOVEMBRO - DECEMBRO

N. 11-12/2015

Karaj Gelegantoj,

Kiel sciata, en oktobro renkontiĝis en Opatija, Kroatio, esperantistoj el Italio, Slovenio kaj la gastiganta lando, por partopreni en la 18^a Alp-Adria Konferenco, kies ĉeftemo estis: ADRIA MARO, MARO DE MEZEŬROPO. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj. La sekretario de la Komitato de Alp-Adria Esperanta Rondo, Edvige Ackermann, mallonge skizis la historion de tiuj kunvenoj, komenciĝintaj en 1955, celantaj starigi amikajn kaj kunlaborajn rilatojn inter la esperantistoj de la tri najbaraj landoj, nome Aŭstrio, Jugoslavio kaj Italio. Do, ni legu ŝian malferman paroladon.

Estimataj Aŭtoritatoj, karaj Alp-Adrianoj, karaj geamikoj!

Post la sukcesa Konferenco en Izola/Slovenio, junio 2013, danke al la iniciatemo kaj entuziasmo de nia Fani Rižnar, ankoraŭfoje ni renkontiĝas sub la emblemo de la Alp-Adria Laborkomunumo. Ĉi foje dankindas la disponebleco, bonvolemo kaj organizaj kapabloj de E-Societo Rijeka kaj aparte de sinjoroj Vjekoslav Morankić kaj Boris Di Costanzo.

La tradicio de tiuj ĉi Konferencoj datas de la jaro 1989, kelkajn jarojn post la starigo de politika projekto, nomita Laborkomunumo de la Regiono de Alp-Adrio, kiu naskiĝis en formo de vasta teritorio, konsistanta en utila instrumento por agado kaj por kontaktoj inter la registaroj de tiu ĉi parto de Eŭropo kaj ankaŭ en ponto inter oriento kaj okcidento, cele al forigo de ideologiaj baroj. La Laborkomunumo startis kun membriĝo de 9 regionoj, kiuj baldaŭ fariĝis 19, [...] el Italio, Aŭstrio, Germanio, Svislando, Hungario, plus Kroatio kaj Slovenio.

Evidentas ke la interkompreniĝa problemo de la Laborkomunumo ne estas simpla: ĉiuj lingvoj de tiuj regionoj estas egalrajtaj kaj uzataj, pli-malpli efike, sed certe kun konsiderinda kvanto da elspezo.

Kaj ĝuste tiu lingva diverseco favoris la agadon de esperantistoj, kiuj jam ekde 1955 organizis jaran kunvenon, ĉiujare en alia lando de tiu ĉi teritorio. [...] Historion pri niaj Konferencoj, ankaŭ pere de bildoj, mi prezentis en Izola.

Eblas deŝiri ĉiujn florojn, sed ne haltigi la printempon.
Pablo Neruda, ĉilia poeto kaj politikisto (1904-1973)

Mi nur atentigas, ke en la lastaj jaroj niaj Konferencoj maloftiĝis, havis iom post iom malpli da partoprenantoj, kaj ĉefe mankis volontuloj por daŭrigi regule la renkontiĝan kaj kunagadan tradiciojn.

La ekonomia kaj politika situacio de niaj landoj kaj ĝenerale de tuta Eŭropo ne helpis nin: multaj ŝanĝiĝoj okazis kaj ne ĉiam en pozitiva senco.

Esperantistoj estas homoj de espero, kaj ni Alp-Adrianoj, pro nia praktike 60-jara kunlaborado, kiu eĉ en plej malfacilaj momentoj ne ĉesis kaj igis realigeblaj interŝanĝojn, kulturajn vivon, viglan amikecon, firme volas plu esperi en plibonigo de nia mondoparto kaj ĝenerale de la mondo.

La nuna Konferenco estas dediĉita al la Adriatika Maro, nia maro, la maro de Mezeŭropo, nur por aludi al la lastaj du jarcentoj, ĉe kies bordoj kunvivas gentoj el diversaj lingvoj kaj kulturoj. Ne ĉiam kunvivado estis glata, paca, senproblema, sed tio ja estas la vivo kaj fluo de historiaj okazintaĵoj, el kiuj oni devus lerni por eviti ripetadon de samaj eraroj. Hodiaŭ ni estas ĉi tie, en Opatija, urbo kiu en antaŭaj tempoj estis unu el la perloj de Mezeŭropo kaj en la nunaj fariĝas ĉiam pli bela, alloga kaj vigla.

Kiel Sekretario de Alp-Adria Esperanta Rondo, mi bonvenigas vin ĉiujn ĉi tie en Opatija kaj esperas viglan partoprenon, viaflanke, en nia asembleo, kiu estos grava por la daŭrigo de nia laboro por E-movado, la disvastigo de la idealoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kaj de niaj Konferencoj. Mi vere ŝatus, dum tiu ĉi oficiala kunveno, ricevi kandidatiĝon por la venonta aranĝo, la 19^a kaj, kial ne?, ankaŭ por la postvenonta, la 20^a Konferenco, kiu signifos belan komunan laboron ne kiel alvenpunkton, sed interesan startpunkton por pliaj jaroj samdirekte.

Dankon por esti ĉi tie kaj por la kontribuado kiujn vi alportos al tiu ĉi 18^a Konferenco.

Edvige Ackermann

La Konferenco, malgraŭ la nemultnombra partopreno, tamen ne estis senrezulta: estis ĵetitaj kelkaj semoj, el kiuj certe burĝonos belaj floroj, atestontaj, ke el amika kunlaborado ĉiam fontas nur io pozitiva.

Via Elda

Laste trovitaj!

Hector Hodler

Kiu esperantisto ne konas ĉi tiun tre gravan svisan pioniron de la Esperanto-movado, eminenta kaj multfaceta Aganto? Certe ĉiu el vi konatiĝis, lege aŭ aŭskulte, kun li. Tamen, laŭ mi, valoras, ke sur la bultenaj paĝoj, almenaŭ unu fojon, li estu menciita, kvankam en tre konciza formo. Ankaŭ al Hector Hodler la desegnisto Jean-Robert, komisiito de eldonistino Alice-Leontine Farges, faris la karikaturon (vidu la apudan poŝtkarton). Tre trafe prezentita li estas sur ĝi: eblas ekscii, ekzemple ke li estis kunfondinto de UEA, direktoro de la Centra Oficejo, sekretario de la 2^a UK okazinta en Ĝenevo (1906) kaj ankaŭ direktoro de la revuo *Esperanto*. Enmane li havas la ŝlosilon bezonatan por malfermi la UEA-domon, ĉirkaŭitan de antenfostoj, kies dratoj estis kunligintaj multajn eŭropajn urbojn.



H. Hodler naskiĝis en Ĝenevo, 1887, kaj mortis en Leysin, 1920. Tro, tro frue, sed en tiuj malmultaj vivojaroj, multe li sukcese faris favore al la movado, por kiu li ĉiam tre energie kaj sindone laboris ekde sia esperantistiĝo, kaj al kiu li liveris sian plej grandan donacon, nome la starigon de UEA, 1908. En 1907, li transprenis la redaktadon de *Esperanto* el la manoj de ĝia fondinto Paul Berthelot¹, fariĝante samtempe ĝia posedanto. Nekredeblas, ke ĝis 1914 la gazeto aperis dufoje monate kun preskaŭ matematika reguleco. Dum 13 sinsekvaj jaroj, escepte de ses monatoj en 1914 pro militkaŭzoj, li zorgis pri la revuo. Ne nur por ĝi li verkis artikolojn aŭ tradukis, sed ankaŭ por aliaj gazetoj, kiaj *Juna Esperantisto*, *L'Espérantiste* kaj *Tra la Mondo*. La gazeton *Juna Esperantisto* li ekredaktis kune kun sia samlernejano Edmond Privat jam en 1903, nur tri semajnojn post ilia ellerno de E-to: ĝin ili kunredaktis dum 5 jaroj. Notindas, ke ambaŭ studis, ĉiam kune, *Idiom Neŭtral*²-on kaj *Bolak*³-on, cele al certiĝo ke efektive Esperanto estas la taŭga lingvo internacia.

Antaŭ la organizado de la 2^a UK en Ĝenevo, H. Hodler ĉesigis sian gimnazian studadon por tute sindediĉi al la granda evento. Feliĉe li kaj lia familio, en tiu tempo, ne plu havis financajn problemojn, ĉar finfine la patro Ferdinand, kiel pentristo, komencis gajni sufiĉe da mono per vendado de siaj verkoj. Danke al lia organiza talento, brila kaj sukcesa estis la UK, kiu

lin eĉ pli riĉigis pro la pluraj interesaj spertoj travivintaj. Interalie li havis okazojn profunde diskuti kun s-ro Théophile Rousseau pri la kreo de Esperanto-servo kaj -oficejo, dum kun Alphonse Carles li parolis pri lia iniciato starigi reton de E-konsuloj, nome reprezentantoj de la lokaj grupoj, taskitaj helpi la petantojn, en turisma, komerca kaj socia kampoj. Li estis plene konvinkita pri la neceso ke la movado devas stariĝi sur fundamento kaj idealista kaj praktika, cele ankaŭ al solidareca kunagado. La projekto plene respondis al la ideoj kaj pensoj de H. Hodler, tial ĝin li tuj enmanigis kaj prilaboris. Per serio de artikoloj en *Esperanto*, li priskribis la novan eblan organizaĵon, kiu ne nur fakte - kiel jam dirite - servu por solvi praktikajn problemojn, sed ankaŭ fariĝu en la mondo plibonigilo de interhomaj rilatoj: jen la ĝermo de la baldaŭ fondota UEA. Priraktante sian planon en la revuo, li havis ankaŭ la eblon pritaksi la favoron aŭ malfavoron de ĝia legantaro. La fakto ke dum la UK, 1907, ekzistis jam ĉirkaŭ 200 konsuloj, confirmis ke la propono estis konsiderita valida kaj - eble iom senkonscie - jam atendata de granda parto de la esperantistaro. En numero 30^a de la 1^a de majo en *Esperanto* aperis la informo pri la fondo de Universala Esperanto-Asocio, la 28^{an} de aprilo 1908.

H. Hodler iĝis la unua ĝenerala direktoro kaj vicprezidanto de UEA, krome redaktoro de la Oficiala Bulteno de la Asocio, per la helpo de la sekretario Hans Jakob. Grandioza faro estis, dum la unua mondmilito, lia organizado, kun H. Jakob, de la helpagado favore al malaperintaj esperantistoj en la militaj landoj. La Centra Oficejo, situanta en Ĝenevo, do en neŭtrala lando, peris per sia delegitaro - inter civitanoj de malamikaj landoj - korespondaĵojn, liveris medikamentojn, nutraĵojn, helpis en la serĉado de personoj, zorgis pri helpo al militkaptitoj ktp. Dum la milito la CO atingis jaran kvanton de pli ol cent mil servoj.

Kia estis Hector Hodler, laŭkaraktere? Preskaŭ vulkano de ideoj, homo firmdecida, intuicia kaj iniciatema, ardentempera, kun forta memfido, kun energia laboremo, sed samtempe kun delikata kaj ĝentila naturo, certe heredita de la patrino Augustine Dupin. Nobla animo kun natura talento. Li multe studis, malgraŭ ke tre frue li estis forlasinta la lernejon, kaj verkis. Liaj korespondaĵoj kun Eduard Stettler estas kolektitaj en 11 volumoj - esence li estis ĵurnalisto.

Tre amata de la patro Ferdinand, svisa pentristo kiu famiĝis post 1900, li aperis en multaj liaj pentraĵoj, ekde la naskiĝo ĝis ĉ. 1911 aŭ 1912. Ferdinand Hodler ne esperantistiĝis, sed aprobis la ideojn enajn de la lingvo kaj eĉ iel-tiel monsubtenis la Esperanto-movadon.

H. Hodler malsaniĝis je tuberkolozo aŭ pulmo-malsano en 1912 kaj mortis en 1920, 33-aĝa. Al UEA Hodler postlasis, akorde kun sia edzino Emilie Ruch, grandan parton de sia havaĵo, kun la celo certigi ĝian pluan ekziston. Li estis nomita honora membro de UEA en 1920 kaj en 1980 la biblioteko de la Asocio ricevis lian nomon.

Ni meditu sur la jenaj vortoj, eldiritaj de Hector Hodler en 1919, ankoraŭ nun tre aktualaj:

“Tio, kion ni emfaze nomas ‘la triumfo de nia afero’ ne estas io estonta kaj malproksima; tiu triumfo konsistas el aro da ĉiutagaj konkretaj sukcesetoj nun realigeblaj. Esperanto ‘triumfas’ ĉiufoje kiam ĝi servas al iu”. (*Esperanto* 15, 1919, *Novaj prospektivoj*).

Notoj:

¹ Franco, naskiĝis en 1882 kaj mortis novembre 1910 en Brazilo. Li eklernis E-on en 1900, kiam li vizitis la liceon en Reims. Fondinto de ‘*Esperanto*’ kaj iniciatinto de la *Internacia Socia Revuo*. En 1907 li iris al Sudameriko, kie ankaŭ propagandis la lingvon. En Rio de Janeiro li konatiĝis kun anarĥisma grupo. Poste li laboris kiel instruisto pri la franca kaj esperanta lingvoj en Petropolis. Sian postenon li perdis pro siaj kontraŭmilitaj ideoj. Interalie li studis, dum sia restado en la stato Gojaso, la lokajn indiĝenojn kaj ilian lingvon. Grave malsaniĝinte pri tuberkolozo, li mortis ĉe la monaĥoj, kiuj flegis lin, en Conceição do Araguaia, komence de novembro 1910.

² Ĝi estas helplingvo internacia, publikigita de la Akademio Internacia de Universala Lingvo (Akademio Internacional de Lingu Universal) en 1902, de inĝ. Waldemar Rosenberger el Sankta-Peterburgo. La Akademio, kies iama nomo estis *Kadem bevünetik volapüka* (Internacia Akademio de Volapük), estis kreita en 1887 por konservado kaj plibonigo de la lingvo de prelato Johann Martin Schleyer. Gvidita de inĝ. Rosenberger, eklaboris grupo tiucele, sed oni ekfaris konsistajn ŝanĝojn kaj en la gramatiko kaj en la vortaro. Tiuj ŝanĝoj kaŭzis la kompletan aliĝon de *Volapük*, tiom ke oni rezulte estis kreintaj tute novan lingvon, kiun oni nomis *Idiom Neutral*. Ĝi estis prezentita (1907), en Parizo kune kun Esperanto, Ido kaj aliaj projektoj al la Delegacio, kiu estus devinta elekti unu internacian helplingvon por la homaro.

³ *Bolak* estas lingvosistemo kreita (1899) de la pariza komercisto Léon Bollak. La nomo konsistas el du vortoj: *bo* = blua; *lak* = lingvo, lingvo blua, laŭ la koloro de la ĉielo, senfina kaj ĉirkaŭanta la tutan mondon. Temis pri lingvo el miksitaj tipo, nome apriora kaj aposteriora. Li aperigis lernolibrojn en la franca, germana, itala, angla, hispana kaj ĉeĥa lingvoj. Ĉefaj mankoj en ĝi estas la gramatiko, tro teoria kaj malfacile memor-ebla, kaj la principoj pri konstruo de la vortaro.

Fontoj: *EdE; Universalaj lingvoj en Svislando, A. Künzli; Utila estas Aliĝo, U. Lins; Historio de la mondolingvo, E. Drezen.*

Maĉgumo: dokumentfilmo, inter miljara historio kaj poluado

Kiu el ni neniam en sia vivo ŝatis sperti la gummaĉadon? Mi havas pri tio tre malnovajn memorojn: naskiĝinta en Triesto, mi travivis, infanaĝe, apartan politikperiodon kiam mia urbo estis sub la Anglo-Usona Militadministrado kaj unu el la plej interesaj ludoj estis alparoli usonajn soldatojn por peti maĉgumojn. Ho, bongustegaj ili estis, kaj poerete mi maĉis ilin por ke tiuj daŭru kiel eble plej longe. Jarojn postajn tiu denta laboro bonŝance ne fariĝis ‘manio’ kaj iom post iom mi forlasis tiun kutimon (kaj ekfumis - ja, eĉ pli malbone!).

Nuntempe gummaĉado estas tre disvastigita ‘malvirto’, sed malantaŭ tiu ŝajne nedanĝera kutimo ekzistas, jam delonge, poluadaj problemoj.

Tiu emo estas fakte tre enradikiĝinta, sed dubindas ke iuj ja konas ĝian originon kaj ĝiajn efikojn sur la medion kaj sanon. Pasintan oktobron la kanada reĝisoro Andrew Nisker senvaligis la misteron pri tiu gummaĉemo, prezentante sian dokumentfilmon – La nekonata flanko de maĉado (*Dark Side of the Chew*) – dum la 13^a eldono de la Festivalo CinemAmbiente (Kino-Medio) en Torino.

Ĝi rakontas la historion de la gumo, kiu - supozeble - eniris nian kulturon jam en tre malproksimaj tempoj. Oni parolas pri rudimentaj maĉgumoj, el antaŭ 3-4000 jaroj, konsistantaj el betula suko moligita per maĉado. Restaĵoj estis trovitaj en Finnlando (2007), kaj oni opinias ke la utiligo estis esence luda (maĉado ĉirkaŭ fajro dum oni rakontas historiojn...).

Hodiaŭ maĉgumoj ne plu estas el betula suko, sed el pura, aŭtentika plasta materialo. La kruda substanco estas polimero devenanta el nafto kaj kio ĝin faras elasta estas la ‘*poliisobutene*’, malutila oleeca materialo, altgrade poluanta. Tiu maĉgumo efikas malbone ankaŭ sur la medion, pro la spuroj sur trotuaroj, plaĉoj, monumentoj ktp - la homa fantazio estas senlima! - lasitaj de malbonedukitaj konsumantoj. La kosto por forpreno de tiuj postlasitaĵoj estas dekoble pli alta ol la kosto de la produktaĵo mem.

Rilate la bonan aŭ malbonan efikon sur la sanon, verŝajne - laŭdire - oni rajtas esti trankvilaj. Plie, en la gumoj enestas *ksilitolo*, elemento kiu devus malhelpi la kreskadon de iuj bakterioj kaŭzantaj karion, malgraŭ ke preferindas, anstataŭe, bone lavi la dentojn trifoje tage! Inter aliaj flankaj efektoj, probable estas ankaŭ tiu senkiala, senutila maĉado kiu provokas pliigon de gastraj sukaj kun risko kaŭzi stomakan acidecon. Psikologo iam klarigis ke tiu preskaŭa dependiĝo de gum-



Projekto "Koní Trieston"

La Halebardo de Triesto

Tutcerte legantoj de TEA-Bulteno jam scias, pri kio temas. Temas pri la blazono de Triesto, aprobita de la itala registraro en 1930, konsistanta el ŝildo ruĝkolora kun halebardo arĝenta kaj, super la tuto, turkrono. Sed kial "halebardo"?

En la jaro 303^a pK, sekve de la persekutoj de Diokleciano*, mortis senkapigita en Sirio la lasta triesta martiro, tribunuso Sergio [Serĝo], fariĝinta poste la dua patrono de Triesto. Laŭ la tradicio li estis militisto de la imperiestra armeo lokita en Triesto, kie li havis tiam tre fortajn ligojn kun la lokaj kristanoj. Kiam li devis forvojaĝi al Oriento, obeante la ordonon de la imperiestro, Serĝo promesis al siaj samurboj sendi apartan signalon, okaze ke li estus martirigita pro sia kredo.

En Sirio, lia kristaneco estis malkovrita, tial sekve de denunco oni submetis lin al plej kruelaj torturoj kune kun lia kamarado Bako. Serĝo rifuzis forĵuri sian kredon kaj pro tio estis kondamnita je senkapigo. Sed kio pri la promesita "signalo"? Fakte ĝi konkretiĝis: halebarda lanco pluvis de la ĉielo meze de la plej granda urba placo!

Tiu evento estis konsiderita mirakla kaj la pinto de tiu lanco tuj estis deponita – tiel laŭlegende! – en la trezorejo de la Sankta-Justa Katedralo, kie ankoraŭ nun troviĝas.

Do, tiu armilo, kiu bele ornamas la triestan ŝildon, ĉiam estis nomata "la triesta halebardo". Tamen ekestas dubo: ĉu la nomo vere estas tiu korekta?

Ni vidu, kion diras nPIV-o. Halebardo: *Lanco kombinita kun batilhakilo* (422^a paĝo); lanco:

Batalilo, konsistanta el longa ligna stango kakra ferpinto, uzata de makedonaj falangistoj, de Mezepokaj k modernaj kavalerianoj ks (655^a paĝo). Nenion apartan tiu difino diras. En la itala enciklopedio Treccani, sub "alabarda" (halebardo) aperas la jena klarigo: blanka armilo, surpinte de longa stango, kiu en la supra parto finiĝas per pikilego, ambaŭflanke tranĉa, aŭ kiel "rostostango" kaj kiu ĉe la kunigpunkto havas ian specon de mallonga hakilo - ĉe unu flanko - kaj unu aŭ pli da pikiloj - ĉe la alia. Anstataŭ la eta hakilo, kelkaj halebaroj havas duonlunon pikilforman. [...]

En alia libro mi trovis jenan teknikan klarigon, laŭ kiu temas pri tiel dirita "korsesko" (*ndr: mi esperantigis la italan terminon, corsesca; france, corséque; germane, Hakenspieß; hispane, corcesca; pole, korseka; angle, corseque*), nome armilo uzata de la infanterioj ne antaŭ la 14^a jc, sekve nekonata de la romiaj legioj, tamen havanta la samajn karakterizojn trovitajn en *Treccani*. Kiel estis uzita tiu "korsesko"? Per la pikilego oni trafis la malamikan rajdiston, dum per la flanko, kurba pikilo oni tranĉis la ĉevalan krurartikon.

Kiel ajn estu, la halebardo iĝis kultobjekto de la popolo, kiu 'grandanime' donis al ĝi tiun legendan ĉielan devenon sed ankaŭ pli ol mil jarojn da historio!

Sed, se ĝi ne falis - kiel sugestas la tradicio - de la ĉielo, kiamaniere ĝi alvenis al Triesto? Tute ne ekzistas fidinda respondo: iuj hipotezas, ke ĝi venis el Oriento (Hinduĵo?), eble alportita en la periodo de Krucmilitoj...

Do, esplorado pludaŭras ...

* Gajus Aurelius Valerius Diocletianus estis romia imperiestro naskiĝinta en Salona, 245(?) kaj mortinta en Spalato, 313(?), ambaŭ urboj de Dalmatio. Li ordonis la lastan, plej sangan persekuton kontraŭ la kristanoj (303).

MALFERMA TAGO: LA 28^{AN} DE NOVEMBRO 2015!

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas por la 43^a fojo al la Malferma Tago, kiu okazos sabaton, la 28^{an} de novembro.

Tiu ĉi **MT** estos la lasta por **Osmo Buller** kiel Ĝenerala Direktoro de UEA. Kvazaŭ adiaŭe li prezentos erojn el sia kolekto de bildkartoj pri Nieuwe Binnenweg kaj rakontos pri la historio de la strato. La prezento rilatos ankaŭ al la 60-jariĝo de la Centra Oficejo en Roterdamo, kie ĝi ekfunkciis novembre 1955 ĉe la placo komence de Nieuwe Binnenweg. La nunan domon ĉe Nieuwe Binnenweg 176 UEA aĉetis en 1961.

Ankaŭ prof. **Humphrey Tonkin** povus kompetente paroli pri la strato de la Centra Oficejo – li verkis pri ĝia ĉirkaŭaĵo la libron *Tuj apude* – sed la temon de lia prelego, *UN ĉe la sojlo de nova epoko*, donis alia datreveno, la 70^a de la fondo de Unuiĝintaj Nacioj. Krome, **Povilas Jegorovas** parolos pri la historio de Baltiaj Esperanto-Tagoj. Tiu aranĝo, komencita en 1959, estis tre grava por la soveta movado kaj daŭre estas populara internacie. En 2016 la 52^{aj} Baltiaj Esperanto-Tagoj okazos en Birŝtonas.

Kiel kutime, en la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj kaj de filmoj. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

Jam de kelkaj jaroj d-ro Antonio de Salvo estas liveranta rete tre interesajn, klerigajn kaj klarigajn informojn, eltiritajn el sia vaste ega arkivo de ĵurnaloj, revuoj, poŝtkartoj, libroj ks, pri la historio de nia movado, pri ne tro konataj (aŭ eble nur forgesitaj?) malnovaj sed elstaraj esperantistoj, pri iamaj Radio-Roma-elsendoj, kaj ankoraŭ pri multo alia. Oni eĉ ne povas imagi, kiom da donitaĵoj li sukcesas ĉerpi el tiu profunda puto, kies fundo ŝajnas neatingebla. Antaŭ kelke da tempo, ekzemple, mi havis la plezuron konatiĝi kun la franca Esperanto-pioniro Claudius Colas (1884-1914), kies vivhistorio jam aperis en "Espero Katolika" fare de Carlo Sarandrea. Li estis unu el fondintoj de tiu revuo, eldonita ekde 1903, kiu ankoraŭ nun daŭre aperas. Al Claudius Colas estos dediĉita iu vendreda vespero (vidu la decembran programon).

El la lavango de artikoloj, mi elprenis ankoraŭ ion, kion indas utiligi por pasigi amuzan, sed samtempe instruan, vesperon, je la 20^a de novembro, TEA-sideje: ĉi foje temas pri lingva ludo (el *L'Esperanto* 1989 -2,3).

Tial ĉi-bultene mi prezentas la koncernan artikolon, ankaŭ por klarigi al la ludontoj, kiel la ludo funkcias.

NI LUDU PER VORTOJ EN ESPERANTO

La tre konata verkisto kaj semiologo Umberto Eco publikigis en sia konstanta paĝo en la semajna revuo *L'Espresso* ekzemplojn de intelektula ludo konsistanta en tio, ke, ekirante de nomo de fama personulo (verkisto, poeto, artisto, politikisto ks), oni verku mallongan tekston pri tiu persono kaj pri liaj verkoj kaj agoj uzante nur vortojn komenciĝantajn per la sama komenclitro kiel lia nomo.

Ni provis fari tiun ludon en la internacia lingvo, komencante de la pseŭdonimo de nia unua aŭtoro, do Esperanto mem.

ESPERANTO: Elspertinte en eosta Eŭropo etnajn enfermiĝojn estigantajn eĉ ekstermojn, edukistfilo elpensis eltrovaĵon ebligantan esprimiĝi evitante embarasojn, en egaleca etoso. Elpensajo eldoniĝis en eta ellernilo: esperema elpensinto epitetiĝis Esperanto; elpensitaĵo estonte egale epitetiĝos.

Ekaperis entuziasmuloj. Ega entrepreno ekmarŝis.

En estanta epoko esprimilo endas en Eŭropo. Enkondukiĝos Esperanto en eŭropajn edukejojn? Espereble!

Ĉu iuj legantoj volos proponi aliajn aplikojn de la ludo, pri aliaj aŭtoroj? Sendu al ni viajn el-laboraĵojn: ni publikigos la plej bonajn.

[*ndr: tio ĉi validas ankaŭ por la legantoj de TEA-Bulteno: mi atendas viajn verkojn!*]



Ministero
dei beni e delle
attività culturali
e del turismo

Je 30 jaroj de la forpaso de
MARIO DAZZINI
la Itala Esperanto-Federacio
la Esperanta Nacia Biblioteko de Esperanto
ĉe la Ŝtata Arkivo
la Komunumo de Massa


la Esperanto-Grupo "Dott. Mario Dazzini" lanĉas konkurson pri la plej bona esejo je la temo: "Mario Dazzini kaj Esperanto".

La verkaĵoj, je maksimuma longo de 22 paĝoj, itale aŭ esperante, neniam antaŭe publikigitaj, oni devas sendi, ene de la 15^a de novembro 2015, al Gruppo Esperantista Massese 'dott. Mario Dazzini' - Poŝta Kesto N. 22, Massa succ. N° 1 - Via Carducci - 54100 Massa kaj samtempe, elektronikforme, al la jena ret-adreso: linguesim@gmail.com

La plej bona eseisto ricevos la monsumon de 300 €, kiel repagon de elspezoj pro esplorado. La ĵurio (la FEI-Prezidanto aŭ ties delegito, kiu prezidos la Komisionon, Urbestro de Massa, Direktoro de la Ŝtata Arkivo, aŭ iliaj delegitoj, Prof-ino Mariella Zoppi, D-ro Alessandro Simonini) okupiĝos ankaŭ pri eventuala prezento de la ellaboraĵoj publikigindaj taŭgaloke. La premia tago estos en decembro ĉj. en Massa.

En la pasinta TEA-Bulteno estis prezentita la esperantisto-pentristo Lodovico Rodo, artnomo de Lodovico Rodolphe Pissaro, kiu portretis ankaŭ Ludoviko Zamenhof-on. Sed li ne estis la sola artisto, kiu alprenis kiel modelon nian Majstron. Unu el tiuj estis **Felix Stone MOSCHELES**.

Naskiĝinta en la jaro 1833^a en Londono kaj mortinta la 22^a de decembro 1917 en Tunbridge Wells, li estis portret-pentristo. Liaj verkoj estis eksponitaj en Parizo, Antverpeno kaj Londono. Lia baptopatro, laŭ kiu li estis nomita, estis Felix Mendelssohn Bartholdy, la fama komponisto, orkestrestro, pianisto kaj orgenisto. F. Mendelssohn estis dumviva amiko de la patro de Felix, Ignaz Moscheles, kiu siavice estis mondkonata muzikisto.



En 1903 Felix Moscheles, membro de la Lingva Komitato, iĝis la unua prezidanto de la Londona Esperanto-klubo. Li estis fervora pacifisto kaj internaciisto, kaj kiel tia ankaŭ funkciis kiel prezidanto de la Internacia Arbitracia kaj Paca Asocio. Kiel pentristo li dediĉis sin ĉefe al portretarto, kun granda sukceso.

Novembra Programo	
3-a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
6-a, vendredo	20h00 - Rememore de niaj karaj Aldo kaj Viglo
10-a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
13-a, vendredo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO - PREZENTO DE KURSOJ 20h00 - Filmo pri Alasko. Prezentas Edvige
17-a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
20-a, vendredo	20h00 - Ni ludu per vortoj! (vd. je paĝo 5 ^a)
24-a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
27-a, vendredo	20h00 - Bruno Migliorini, de Carlo Minnaja
28-a, sabato	17h30 - Inaŭguro de la ekspozicio pri pentraĵoj

Decembra Programo

1-a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
4-a vendredo	20h00 - Kiu konas la esperantopioniron Claudius Colas?
5-a, sabato	17h00 - Konkurso pri pentrado - Premio "Liliana Cernecca Soranzo" - Disdonado de la premioj
8-a, mardo	Festotago - Sidejo fermita
11-a, vendredo	20h00 - POESIA , prelego itallingva de Davide Astori
12-a, sabato	16h30 - Zamenhof-Tago kaj Tago de la Libro
14-a, lundo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO - 9 MINUTOJ KUN...
15-a, mardo	17h00 - Konversacia rondo
18-a, vendredo	20h00 - Legado de la impona verko de C. Minnaja "Historio de la Esperanta Literaturo"
22-a, mardo	19h30 - Kristnaska Festo
29-a, mardo	20h00 - Adiaŭ, 2015^a jaro!

de paĝo 3a

maĉado estas donita de la stimulado de nervaj plezurfinaĵoj kaj per tio klarigeblas la granda sukceso de maĉgumoj. Ĉu oni troigas? Nur unu ekzemplo: dum la dua mondmilito estis konsumitaj 150 miliardoj da gumoj! Tre impona kvanto, ĉu ne? Kaj kien oni forĵetis tiujn maĉumaĵojn? Konsidere de la nuntempa preskaŭ ĝenerala malobservado de la plej simplaj kondutreguloj rilate zorgadon kaj atentadon de la media ĉirkaŭaĵo, oni devus pripensi pri efikaj rimedoj por ilin elimini: se gumoj estas ĵetitaj en marojn aŭ riverojn, kiom da tempo bezonatas antaŭ ties detruigo?

Ne temas pri banala problemoj!

2^A KONKURSO PRI PENTRADO POR DULINGVAJ VERKOJ PREMIO "LILIANA CERNECCA SORANZO" JARO 2015

La ekspozicio de la konkursantaj pentraĵoj okazos ekde **sabato la 28^a de novembro** ĝis la 5^a de decembro 2014, en la sidejo de TEA, via del Coroneo 15, kun jena horaro: **17.30 -19.30**, ĉiutage sed ne dimanĉe.

INAŬGURA TAGO

Sabaton la 28^{an} de novembro
je la 17a horo kaj 30.

PREMIA CEREMONIO

de la gajnintaj konkursantoj:

Sabaton la 5^{an} de decembro
je la 17h00

Triesta Esperanto-Asocio atendas vin multnombraj okaze de ĉi evento.

Disvastigu ĉi tiun informon inter viaj amikoj, konatoj, parencoj ...

*Bonan Kristnaskon kaj
Pacan 2015^{an} Jaron
al la TEA-anoj kaj Gelegantoj
deziras Triesta Esperanto-Asocio!*



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 17-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredito - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org;
www.karstajtagoj.altervista.org